17

# LA VOJO DE KLERIGO

1934

№ 1

KVARONJARA BULTENO DE „KOM. KLERIGO“,
organo de l'Popola Komisario por klerigo de Ukrainia SSR

ADRESO: Kiev, USSR, Ukrainio, Narkomos, red. de „Kom. osvita“

Г.П.Б. в ЛН 1935 Акт 2

En januaro 1934 okazis en Moskvo la XVII-a kongreso de Komunista Partio (de bolŝevikoj) de Sovetunio. La kongreso en raportoj de l'partiaj gvidantoj, en la larĝaj debatoj k akceptitaj rezoluoj resumis la rezultojn de l'una jarkvino de l'socialisma konstruado en USSR rilate ĉiujn branĉojn de l'ekonomio k kulturo k metis koncernajn taskojn por la dua jarkvino.

Ni donas en nia bulteno fragmentojn el raportoj k rezoluo, dediĉitajn speciale al problemoj de l'kultura konstruado, nome:

1) el la raporto de kdo Stalin pri la atingaĵoj de l'una jarkvino,

2) el la raporto de k-do V. Molotov pri la taskoj de l'dua jarkvino.

3) el la rezoluo pri la taskoj de l'dua jarkvino — la „Programon de plialtigo de l'materiala k kultura nivelo de laboristoj k kamparanoj.“

J. STALIN

## LEVIĜO DE MATERIALA BONSTATO KAJ KULTURO DE LABORULOJ EN USSR DUM LA UNA JARKVINO

(El la raporto al XVII Kongreso de KP(b) SU)

... Ni pentris la staton de nia industrio k kamparekonomio, ilian evoluon dum la raporta periodo, ilian staton nuntempan. Rezulte ni havas:

a) la potencan leviĝon de la produktado en la industrio k same en la ĉefaj branĉoj de l'kamparekonomio;

b) sur bazo de ĉi tiu leviĝo la definitivan venkon de la socialisma ekonomisistemo super la kapitalisma sistemo en la industrio k same en la kamparekonomio, la transformon de socialisma sistemo en solan sistemon de la tuta popolekonomio, la forpuŝon de la kapitalismaj elementoj el ĉiuj sferoj de la popolekonomio;

c) la definitivan foriron de la grandega pliparto de la individumastrumantaj kamparanoj for de la etvara individua mastrumado, ilian kuniĝon en kolektivajn mastrumojn sur bazo de kolektiva laboro k kolektive posedataj produktiloj, la plenan venkon de la kolektiva ekonomio super le etvara individua mastrummaniero;

ĉ) la kreskantan procedon de l'plua kolĥozvastiĝo je konto de individuaj kamparanmastrumoj, kies nombro tiele falas de monato al

monato k kiuj laŭesence transformiĝas en helpan forton por la kolĥozoj k sovĥozoj.

Kompreneble, ke ĉi-tiu historia venko super ekspluatistoj devis rezultigi radikalajn plibonigojn en la materiala stato, en la tuta vivmaniero de la laboruloj.

La likvido de parazitaj klasoj venigis la malaperon de l'ekspluato de homo per homo. La laboro de laboristo k de kamparano estas liberigita de l'ekspluatado. La enspezoj, kiujn elpremis la ekspluatistoj el la popola laboro, restas nun en la manoj de laboruloj kaj estas uzataj parte por pligrandigi la produktadon kaj altiri al la produktado novajn taĉmentojn de laboruloj, parte — por senpere plialtigi la enspezojn de laboristoj k kamparanoj.

Malaperis la senlaboreco — la vipo al laborista klaso. Se en la burĝaj landoj milionoj da senlaboruloj spertas mizeron k suferon pro manko de l'laboro, ĉe ni plu ne ekzistas laboristoj, kiuj ne havus laboron k perlaboraĵon.

Kun malapero de l'kulaka jugo malaperis la mizero en la kamparo. Ajna kamparano, ĉu kolĥozano ĉu individue mastrumanta, nun povas vivi hominde, se nur li volas labori honeste, sed ne fimaldiligenti, ne vagabondi k ne ŝteli la kolĥozan havaĵon.

La neniigo de ekspluato, neniigo de senlaboreco en la urboj, neniigo de mizero en la kamparo — tio-ĉi estas tiaj historiaj atingaĵoj en la materiala stato de laboruloj, pri kiuj ne povas eĉ revi laboristoj k kamparanoj de la plej „demokratiaj" burĝaj landoj kiaj nur povas esti.

Ŝanĝiĝis la fizionomio de niaj grandaj urboj k industriaj centroj. Neevitebla signo de grandurboj en burĝaj landoj estas la truegaĉoj, la t. n. laboristaj kvartaloj en randpartoj de urboj, kiuj prezentas amason el mallumaj, humidaj, plejparte keletaĝaj, duondetruitaj ejoj, kie kutime sin rifuĝas senhavularo, svarmante en la koto k malbenante la sorton. La revolucio en USSR rezultigis, ke tiaj truegaĉoj malaperis ĉe ni. Ili estas anstatitaj per novkonstruitaj bonaj k lumplenaj laboristaj kvartaloj: ĉe tio, en multaj okazoj laboristaj kvartaloj aspektas ĉe ni pli bone, ol urbocentroj.

Ankore pli ŝanĝiĝis la fizionomio de la vilaĝo. La malnova vilaĝo kun ĝia preĝejo sur la plej videbla loko, kun ĝiaj plej bonaj domoj de l'urjadniko [1]), popo, kulako sur la anta plano, kun ĝiaj duondisfalintaj kabanoj de vilaĝanoj sur la malanta plano, komencas malaperi. Ĝin anstatas la nova vilaĝo kun ĝiaj soci-mastrumaj konstruaĵoj, kun ĝiaj kluboj, radio, kino, lernejoj, bibliotekoj, k infanvartejoj, kun ĝiaj traktoroj, kombajnoj, draŝmaŝinoj, aŭtomobiloj. Malaperis la malnovaj eminentaj figuroj de l'kulako-ekspluatisto, de procentegulo sangosuĉanto, de komercisto-spekulanto, de pastro, urjadniko. Nun eminentaj homoj estas la funkciuloj de kolĥozoj k sovĥozoj, de lernejoj k kluboj, la ĉeftraktoristoj k kombajnistoj, brigadestroj de kampokulturo k brutbredado, plej bonaj ŝturmgelaborantoj de la kolĥozaj kampoj.

Malaperas la kontreco inter la urbo k kamparo. La urbo ĉesas esti ant la okuloj de la kamparanoj centro de ilia ekspluatado. Ĉiam

---

[1]) Urjadniko — vilaĝa policisto en cara Rusio. — La red.

pli fortikaj iĝas la fadenoj de l'ekonomia k kultura kunligo inter la urbo k kamparo. De la urbo k ties industrio la kamparo ricevas nun helpon — per traktoroj, agromaŝinoj, aŭtomobiloj, homoj, monrimedoj. Anke la kamparo mem havas ja nun sian industrion en la formo de maŝin-traktoraj ŝtacioj, riparmetiejoj, ĉiuspecaj industri-entreprenejoj kolĥozaj, malgrandaj elektrostacioj ktp. La kultura abismo inter la urbo k kamparo estas plenigata.

Tiaj estas la ĉefaj atingaĵoj de laboruloj rilate plibonigon de ilia materiala stato, vivmaniero, kulturo.

Sur la bazo de tiuj atingaĵoj ni havas dum la raporta periodo [2]):

a) kreskon de la popolenspezo de 35 miliardoj rubloj en 1930 ĝis 50 mlrd. en 1933; krome, ĉar parto de kapitalistaj elementoj, inter ili — de eksterlandaj koncesiuloj, en la popolenspezo egalas nuntempe malpli ol duonprocento, preske latuta popolenspezo distribuiĝas inter la laboristoj kaj oficistoj, laborulaj kamparanoj, la kooperacio kaj la ŝtato;

b) kreskon de la loĝantaro en Sovet-Unio de 160,5 milionoj en fino de 1930 ĝis 168 mln. en fino de 1933;

c) kreskon da kvanto de laboristoj kaj oficistoj de 14.530.000 en 1930 ĝis 21.883.000 en 1933, samtempe kvanto da fizike laborantoj altiĝis dum tiu-ĉi periodo de 9.489.000 ĝis 13.797.000, kvanto de laboristoj de la granda industrio, enkalkulante laboristojn de transporto, altiĝis de 5.079.000 ĝis 6.882 000 homoj, la kvanto da agrikulturaj laboristoj — de 1.426.000 ĝis 2.519.000 homoj, kaj la kvanto da laboristoj kaj oficistoj en komerco — de 814.000 ĝis 1.497.000 homoj;

ĉ) kreskon de salajra fonduso por laboristoj kaj oficistoj de 13.597 milionoj rubloj en 1930 gis 34.280 mln. en 1933;

d) kreskon de meza jara laborpago de laboristoj de l'industrio de 991 rubloj en 1930 ĝis 1.519 rubloj en 1933;

e) kreskon de la soci-asekura fonduso de laboristoj kaj oficistoj de 1.810 men. rubloj en 1930 ĝis 4.610 men. en 1933;

f) transiron de la tuta surtera industrio al la sephora labortago;

g) helpon de la ŝtato al kamparanoj, per organizo por ili de 2.860 maŝin-traktoraj ŝtacioj kun investo en tio de 2 mlrd. rubloj;

ĝ) helpon de la ŝtato al kamparanoj per kredito al kolĥozoj en la sumo de 1.600 mln. rubloj;

h) helpon de la ŝtato al kamparanoj per semaĵ k nutraĵ-prunto dum la raporta periodo en la sumo de 262 mln. pudoj da greno;

h) helpon de la ŝtato al malfortmastrumaj kamparanoj per rabatoj rilate la imposton kaj asekuron en la sumo de 370 mln rubloj.

Koncerne la kulturan disvolvon de la lando ni havas dum la raporta periodo:

a) enkondukon tra la tuta USSR de ĝenerala deviga elementa klerigo k plialtigon de l'procento de l'alfabeteco de 67% ĉe la fino de 1930 ĝis 90% ĉe la fino de 1933;

b) kreskon de la nombro da lernantoj en la lernejoj ĉiugradaj de

---

[1]) T. e. dum la jaroj 1929 — 1933, kiuj pasis inter la XVI k XVII kongresoj de KP(b)SU.— La red.

14.358.000 en 1929 ĝis 26.419.000 homoj en 1933, inter ili en la elementa klerigo — de 11.697.000 ĝis 19.163.000, en la meza klerigo — de 2.453.000 ĝis 6.674.000, en la supera klerigo — de 207.000 ĝis 491.000 personoj;

c) kreskon de l' nombro da infanoj en la antlerneja instruado de 838.000 en 1929 ĝis 5.917.000 en 1 33;

ĉ) kreskon de l'nombro da superaj lernejoj, ĝeneralaj k specialaj, de 91 en 1914 ĝis 600 en 1933;

d) kreskon de l'nombro da scienc-esploraj institutoj de 400 en 1929 ĝis 840 en 1933;

e) kreskon de l'instituoj de kluba tipo de 32.000 en 1929 ĝis 54.000 en 1933;

f) kreskon de l'nombro de kino-teatroj, kino-instalaĵoj en la kluboj k migrantaj kino-instalaĵoj de 9.800 en 1929 ĝis 29.200 en 1933;

g) kreskon de l'foja eldonkvanto de ĵurnaloj de 12.500.000 en 1929 ĝis 36.500.000 en 1933.

Ne superfluas, eble, noti, ke la specifa pezo de laboristoj inter la lernantoj en la superaj lernejoj estas ĉe ni 51,4%, la specifa pezo de laborulaj kamparanoj — 16,5%, dum en Germanio, ekzemple, la specifa pezo de laboristoj inter la lernantoj en la superaj lernejoj estis en 1932/33 lernjaro nur 3,2%, k la specifa pezo de etkamparanoj — nur 2,4%.

Necesas noti, kiel ĝojigan fakton k kiel signon por la kresko de kultureco en la kamparo, la kreskon de l'aktiveco de virinoj-kolĥozaninoj en la sfero de soci-organiza laboro. Estas konata, ekzemple, ke el virinoj-kolĥozaninoj nunokupas postenon de kolĥoz-prezidantoj — ĉ. 6 miloj, estas membroj de kolĥoz-administrioj — super 60 miloj, brigadestroj — 28 miloj, ĉenaj [1]) organizantoj — 100 miloj, estroj de kolĥozaj varjfarmoj — 9 miloj, traktoristoj — 7 miloj. Ne necesas eĉ diri, ke ĉiu-ĉi ciferoj ne estas kompletaj. Sed eĉ tio eta, kion ili enhavas, sufiĉe hele parolas pri la granda kresko de l'kultureco en la kamparo. Tiu-ĉi cirkonstanco havas, gekamaradoj, grandegan signifon. Ĝi havas grandegan signifon, ĉar la virinoj konsistigas duonon da loĝantaro en nia lando, ili konsistigas grandegan laborarmeon, ili estas destinitaj eduki niajn infanojn, nian estontan generacion, tio estas, nian estontecon. Jen kial ni ne povas permesi, ke tiu-ĉi granda armeo de laborulinoj vegetu en mallumo kaj senscio. Jen kial ni devas saluti la kreskantan socian aktivecon de laborulaj virinoj kaj ilian promociadon al gvidpostenoj, kiel senduban signon pri la kresko de nia kultureco (longedaura aplaŭdado).

Fine, mi devas noti ankore un fakton, sed havantan jam negativan karakteron. Mi aludas tiun nepermeseblan fenomenon, ke niaj pedagogiaj kaj medicinaj „fakultatoj" ankore ĝis nun troviĝas en malatento. Tio-ĉi estas granda manko, limanta al malzorgo pri interesoj de la ŝtato. Tiun-ĉi mankon oni devas nepre likvidi, kaj ju pli balde tio estos farita, des pli bone ĝi estos.

---

[1]) „Ĉeno" estas laborgrupo en kolĥozo. — La red.

V. MOLOTOV

# LEVIĜO DE L'MATERIALA KAJ KULTURA NIVELO DE LABORULOJ EN LA DUA JARKVINO

El la raporto pri „La taskoj de la dua jarkvino", prezentita al la XVII kongreso de KP(b)SU

La forto de l'socialismo estas en tio, ke la gigantan leviĝon de l'popola ekonomio la socialisma konstruado neforŝireble ligas kun la ega plialtigo de la bonstato de laborulaj amasoj. La anteniro de l'socialismo signifas neniigon de kapitalismaj elementoj — ekspluatistoj de laboruloj. Tio ĉi signifas, ke la enspezoj, kiuj iris ante en la manojn de ekspluatistoj, en la manojn de parazitoj, nun transiras al la laboruloj mem. Kompreneble, ke ĉi ĉio okazas en la kruela batalo de laboruloj kontr la restaĵoj de burĝaj klasoj. Sed nur en ĉi batalo laboristoj k kamparanoj elkonkeras por si novan vivon, eliras el la mizero k mallumo, en kiuj ilin tenis kapitalistoj k bienuloj. Jam dum la una jarkvino ni atingis radikalan plibonigon en la stato de laboristoj. Multon valoras jam nura neniigo de senlaboreco k certeco de ĉiuj niaj laboristoj pri la morga tago, pri la garantiiteco de l'laboro! Nenie en la tuta mondo la laboristoj povas eĉ revi pri tio. La vera renverso okazis anke en la stato de kamparanaro dum lastaj jaroj. Kolektivigo forbalais grandan kvanton da kulakoj k elkondukis la tutan amason de malriĉuloj k merriĉaj kamparanoj sur vojon de efektiva leviĝo. Vilaĝo, kiu de jaro al jaro mizeriĝis, estas nun kreita vilaĝo, kiu de jaro al jaro iras sur vojo de l'leviĝo. Plej bona montrilo de radikala plibonigo de vivkondiĉoj de l'kamparanaro estas la fakto, ke malgre kresko de bonstato de laboristoj, ni havas en multaj okazoj mankon de laboristoj en urboj, dum en ĉiuj kapitalistaj landoj oni elpensas rimedojn kontr alfluo de duonmalsataj vilaĝanoj en urbojn pro perlaboro.

La forto de l'dua jarkvino estas en tio, ke ni povas nun iri sur vojo de l'leviĝo de bonstato de laboruloj ankore pli rapide.

Mi komencos de la stato de laboristoj. Ĉe ni, certe, ne ekzistas danĝero, ke aperos senlaboreco inter laboristoj. Male — la kvanto da laboristoj kaj oficistoj dum la jarkvino kreskas de 22,9 milionoj homoj en 1932 ĝis 28,9 mln. en 1937, t. e. je 26%. Kvanto da laboristoj kaj oficistoj senpere laborantaj en la industrio kreskas preske je 2,2 mln. homoj, tio estas je 28%. Grandegan signifon havas la fakto, ke por la tuta kreskanta junularo en familioj de laboristoj kaj oficistoj estas asekurita la laboro k ke, fininte certan kurson de lernado, ili eniros en la vicojn de laboruloj de l'soveta ŝtato.

Ant la laboristoj de nia lando ne staras danĝero de plilongigo de labortago. Male — la labortago en nia industrio jam estas mallongigita ĝis 7 horoj, kaj por pli malfacilaj laboroj — ĝis 6 horoj kaj pli malmulte. La ŝtato postulas nur solan aĵon — honestan kaj tuttempan laboron dum tiu-ĉi mallonga labortago.

Rilate la enspezon de laboristoj kaj oficistoj — la plialtigo de

reala salajro estas apogpunkto en la dua jarkvino. Kompare kun nivelo de 1932 la reala salajro devas kreski dum la jarkvino du oble. Tio ĉi signifas, ke ĝenerala dimensio de l'fizika volumeno de porhoma konsumado de laboristoj kaj oficistoj (de neagrikulturaj laborbranĉoj) devas plingrandiĝi duoble.

Kresko de reala salajro de laboristoj kaj oficistoj venas el tri sekvantaj fontoj:

a) sufiĉe granda kresko de monenspezo de laborista familio;

b) granda kresko de senpagaj servoj, kujn ricevas laboristoj k oficistoj el ŝtataj k aliaj fondusoj de kultura k priviva priservo;

c) grandega malaltigo de prezoj por la varoj de amasa konsumado.

La salajra fondeso en ĉiuj branĉoj de popola ekonomio kreskas dum jarkvino de 32,7 miliardoj rubloj ĝis 50,65 mlrd. rubloj, t. e. pligrandiĝas je 54,7%. Monenspezo de laboristoj k oficistoj pligrandiĝas je 37%, k meza salajro de laboristoj k oficistoj pligrandiĝas je 22,8%. Ni pensas, ke ĝenerala pligrandiĝo de permona salajro dum la dua jarkvino ne estas ĝusta oreintiĝo. Pligrandiĝo de salajro de laboristoj okazos ja rezulte de kresko de l'laborproduktiveco kaj de sufiĉe granda plialtiĝo de kvalifiko de laboristoj, k anke pro plialtigo de salajro, farita dum la una jaro de la dua jarkvino. Fine, monenspezo de l'laboristoj pligrandiĝos ankore tial, ke en laboristaj familioj plimultiĝos nombro da laborantoj, nombro da stipendiuloj, pensiuloj ktp.

Grandan signifon por la kresko da l'reala salajro de laboristoj k oficistoj havas elspezoj de la ŝtato por kultura k priviva senpaga priservo de laboruloj. Tiuj ĉi elspezoj, kune kun elspezoj de sindikatoj, pligrandiĝos dum la jarkvino de 4,3 mlrd. rubloj ĝis 9,3 mlrd., t. e. pli ol duoble.

Tiuj ĉi monrimedoj estos elspezitaj por pligrandigo de pensioj k sociasekuraj monhelpoj, por pligrandigo de elspezoj por eduko k instruo de infanoj k maturaĝuloj, por kuracado, infarvartejoj, ripozejoj, sanatorioj k aliaj rimedoj por plibonigo de loĝejaj k kulturaj vivkondiĉoj de laboristoj k oficistoj.

Decidigan signifon en la kresko de l'reala salajro havas la projektita en la kvinjara plano malaltigo de pomalgrandaj prezoj por varoj de l'amasa konsumado je 35%. Kiel oni scias, dum lastaj jaroj ni ne unfojon devis konsenti al plialtigo de verprezoj. Nun nia industrio plifortiĝis, la kamparekonomio finis sian raorganizan periodon, niaj kadroj[4]) plimultiĝis k tial ni havas ĉiujn premisojn por plimalaltigo de produktad-memkosto k plimalgrandigo de neproduktivaj elspezoj, por decide malaltigi varoprezojn. Malaltigi prezojn je 35% ne estas malgranda problemo, sed tiun-ĉi problemon ni povas solvi, k tial ni devas ĝin solvi ĉiaokaze. En tio estas ĉefa levilo por levigo de l'bonstato de laboruloj en urboj k kamparo dum la dua jarkvino.

La vilaĝo eniris en periodon de l'rapida leviĝo. Bonstato de kolĥo-

[4]) Kadroj — laborfortoj, precipe kvalifikitaj.

zanoj kreskas okulvideble. Ĉu okaze ni ricevis rekorde altan rikolton de greno, post kiam la kolĥozoj travivis reorganizan periodon k atingis stabilecon? Oni scias anke, ke la rikolto de greno estis plej alta tie, kie pli bone estis organizitaj kolĥozoj, kie ili plifortiĝis. Ekzemplo de Kabardo, kie un labora tago[5]) gajnis ĝ s un pudo da greno (kalkulante maizon) k kie kolĥozoj efektive iom jam plifortiĝis, parolas por si mem.

Por rapide plibonigi sian vivon, la kampuloj-kolĥozanoj devas memori unuunuran alabon — honeste ĵori en kolĥozo k zorge rilati al kolĥoza havaĵo. La ŝtato siavice donas por helpo al kamparanaro ne nur traktorojn, aŭtomobilojn, kombajnojn, agromaŝinojn, riparmetiejojn k alian teknikan ekipon, sed anke — intensive preparas kadrojn de spertaj specialistoj de agrikulturo k anke organizas preparadon de tutaj armeoj de traktoristoj, kombaĵnistoj kolĥozaj brigadestroj, gvidantoj de kolĥozaj k maŝin - traktoraj stacioj. Por leviĝo de la brudbredado, la ŝtato ne nur helpas al kolĥozoj k sovĥozoj, sed ĉiamaniere plifaciligas likvidon de senbovinaj kolĥozanaj mastrumoj, organizante krediton k liveradon de bovidinoj al kolĥozanoj, nehavantaj bovinon. Ni havos jam en tiu - ĉi jaro, t.-e. en la dua jaro de l'dua jarkvino, grandegajn regionojn, kiaĵgas nulo la nombron de senbovinaj kolĥozanaj mastrumoj k liveros al ĉiuj kolĥozanoj bovinon aŭ bovidinon. Grandan rolon en liverado al kolĥozoj de bonrasa bruto, bonkvalita semo k. t. p., ludos niaj sovĥozoj.

Sekve estas kreitaj ĉiuj kondiĉoj, por fari ĉiujn kolĥozojn bolŝevistaj k asekuri al la kolĥozanoj kulturan k bonstatan vivon. Tiun-ĉi lozungon de kdo Stalin ni povas k devas efektivigi jam dum unaj du - tri jaroj de la dua jarkvino. Tiamaniere, finfine, multmilionaj kamparanaj amasoj ekvivos hominde, kulture.

Koncerne la kulturan disvolvon USSR antenpaŝas kiel giganto.

Dum la dua jarkvino ni devas en ĉi - sfero efektivigi jenajn taskojn:

a) Likvidon de l'analfabeteco inter la tuta l'oĝantaro. Ĉi - tasko estas plene efektivigebla jam en la daŭro de du - tri plej proksimaj jaroj.

b) Efektivigo de l'ĝenerala deviga politeknika instruado en la amplekso de l'sepjarlernepo ne nur en la urboj, sed anke en la kamparo. Konforme al tio - ĉi la kontingento de l'sepjarlernejo devas kreski de 21,7 ĝis 28,8 mln. lernant. j. Ĉi tasko devas fariĝi centra tasko de l dua jarkvino en la disvolvo de nia lernejo.

c) Plimultigon de ĝenerala kvanto da pedagogiaj kadroj en la ĝeneralinstrua lernejo dum la jarkvino de 628 ĝis 834 miloj. La lernejoj riceva pedagogojn kun la supera k meza klerigo, kio, kun samtempa provizado de lernejoj k lernantoj je lernolibroj, lerniloj k necesa ekipo, multflanke levas la kvaliton de l'lerneja laboro. La plialtigo de la kvalito de instruado dum la realigo de politeknikigo

[5]) "Labora tago" („trudodénj") estas uno por mezuri k pripagi la labortempon de kolĥozanoj.— L a r e d.

de l'lernejo sur la marksisma-leninisma fundamento rilatas al unarangaj taskoj de l'partio k registaro.

ĉ) Plimultigon de l'ĝenerala kvanto da lernantoj (en elementaj k mezaj lernejoj, laboristaj fakultatoj, fabrik-uzinaj lernejoj, teknikumoj, superlernejoj k teknikaj superlernejoj) de 24,2 mln. homoj en 1932 ĝis 36 mln. homoj en 1937.

d) Ĉirkumprenon per socia k antlerneja edukado de infanoj en la aĝo ĝis 7 jaroj en la kvanto 16 mln. infanoj en 1937 anstat 5,2 mln. infanoj en 1932 — pligrandigo pli ol triobla. Anke tie ĉi la plej grava tasko estas asekuro por la antlerneja edukado de kvalifikitaj kadroj — pedagogoj k gvidantoj.

e) Plimultigon de la kvanto da lernantoj en ĝeneralklerigaj lernejoj[6]) k en la kursoj de plialtigita tipo[6]) atingas 10,5 mln. homojn, kio estas ligita kun la ega aspiro al la kulturo ĉe larĝaj amasoj de l'loĝantaro.

f) Plimultigon de la reto de kluboj, hejmoj de l'kulturo vilaĝaj legodomoj, ktp de 49,3 ĝis 76,9 miloj, t. e. pli ol unkajduonoble.

g) Plimultigon de la reto de amasaj bibliotekoj dum la jarkvino de 15 ĝis 25 miloj, k de ilia libra fonduso — trioble.

ĝ) Plimultigon de la kvanto da radiosendejoj dum la jarkvino de 57 ĝis 88, k de la kvanto da akceptaj radiopunktoj por 1000 da loĝantoj en USSR de 13 entute tra la lando ĝis 44, k tra la urboj - ĝis 78 radiopunktoj.

h) Plimultigon de la nombro da sciencaj laboristoj de scienc-esploraj institutoj (sen teknike-servaj k sen aspirantaro[7]) dum la jarkvino de 44,1 miloj en 1932 ĝis 50 miloj.

La plej grandan tiempon[8]) de l'kresko en ĉiuj branĉoj de l'kultura konstruado havos la naciaj respublikoj k regionoj. Neniam ankore estis kreitaj tiom favoraj kondiĉoj por la kresko de naciaj kulturoj k por larĝa promocio de novaj kulturaj kadroj elinter laboruloj de ĉiuj nacioj de USSR. En la ega kresko de naciaj kulturoj sur la socialisma fundamento manifestigos la venkoplena kresko de l'socialismo en USSR, k tiu kresko prezentos al popoloj de la tuta mondo novajn multajn ekzemplojn de tio, ke en nia tempo nur socialismo povas esti bazo de efektiva ekonomia k kultura leviĝo.

Estas anke grandaj problemoj pri plibonigo de la sanprotekto de laboruloj en la dua jarkvino. Skalo de tiuj taskoj povas esti karakterizita ekzemple, per tio, ke elspezoj por sanprotekto, laborista ripozo kaj korpokulturo de 5,4 mlrd. rubloj dum la una jarkvino plirgandiĝos ĝis 19,6 mlrd. rubloj dum la dua jarkvino, t. e. kreskos preske 4-oble. Nombro da kuracejaj litoj en la urboj pligrandiĝos je 44%, en la vilaĝoj je 98%. Sufiĉe multe kreskos anke la medicinaj kadroj.

Unarangan signifon por laboristoj havas plibonigo de loĝej-kondiĉoj. La tuta loĝeja fonduso dum la dua jarkvino pligrandiĝos de 185 mln. kvadratmetroj ĝis 246 mln. kvadratmetroj, t. e. je 33%.

---

[6]) Temas pri instruejoj por plenaĝuloj.— Red.

[7]) Aspiranto — studento sin preparanta por scienc-esplora laboro.— La red.

[8]) Tiempo (neologismo) — rapideco de l'laboro, de socia procedo ks.— La red.

Rezulte de la rapida kresko de loĝantaro, la loĝeja normo kreskas, tamen, nur je 15%, sed en kelkaj industrio-branĉoj ĝi kreskas pli rapide; ekzemple, en la maŝinkonstrua industrio la loĝeja normo kreskos je 22%, en la nigra metalurgio je 33%, en la ŝtonkarba—duoble.

Fine, pri plibonigo de provizado al urbo kaj vilaĝo kaj pri pligrandigo de varocirkulado.

Kiaj estas varfondusoj, pri kiuj ni disponos dum la dua jarkvino?

Ni jam scias, en kiaj tiempoj kreskos dum la dua jarkvino malpeza k nutraĵa industrio k aliaj branĉoj de produktado de varoj por larĝa konsumado. Konforme al tio, rapide kreskos la disponebla al ni fonduso de varoj por larĝa konsumado. Se en 1932 la tuta maso de industriaj varoj, produktitaj de la ŝtata industrio, kune kun nutraĵaj kaj porgustaj varoj, estis taksata je 14 mlrd. rubloj (en senŝanĝaj fabrikaj vendprezoj de 1932), do en 1937 tiu ĉi varproduktado kreskos ĝis 34,2 mlrd. rubloj (en la samaj prezoj), t.e. je 135,5%. Iom pli malrapide kreskas produktado de varoj por amasa konsumado en la hejmindustria koopero, sed aliflanke nemerkataj fondusoj kreskos konsiderinde pli malrapide, ol la merkataj.

Rezulte la merkata fonduso de varoj por amasa konsumado al la fino de l'jarkvino kreskos. Tiamaniere la merkata produktado de varoj por amasa konsumado al la fino de la kvinjaro pligrandiĝos pli ol 2½-oble. Rapidtiempe kreskas anke la produktado de l'kamparekonomio kun samtempa granda kresko de persona konsumado de kolĥozanoj.

Pligrandiĝo de pormerkata maso de agrikulturaj produktoj okazas, une—helpe de fundamentaj ŝtataj enspezoj (de l'imposto, da naturpago al maŝintraktoraj ŝtacioj, sovĥozoj), due—helpe de apudurbaj mastrumoj, trie—per kolĥoza komerco kaj decentraligita aprovizado. Ĉiuj tiuj-ĉi fontoj de pligrandigo de agrikulturaj varoproduktoj donas eblon pligrandigi provizadon per tiaj produktoj kiel greno, terpomoj, legomoj, preske duoble, kaj per viando k lakto—proksimume 2½ oble.

Rezulte ni havas rapidan kreskon de ĝenerala pomalgranda varocirkulado de la ŝtata k koopera komerco samtempe kun la socia nutrado.

## PROGRAMO DE PLIALTIGO DE L'MATERIALA KAJ KULTURA NIVELO DE LABORISTOJ KAJ KAMPARANOJ

(La III. divido de la unanime akceptita rezoluo de l'III kongreso deKP(b)SU laŭ la raqortoj de kdoj Molotov kaf Kujbiŝev: „Pri la de injara plano de la disvolvo de l'popola ekonomio de USSR").

Neniigo de senlaboreco k asekuro de laboro al ĉiuj laboristoj k oficistoj kun la sistemece efektivigata en la soveta ŝtato plibonigo de kondiĉoj de ilia laboro, malplilongigo de l'labortago ĝis 7 horoj k ekzisto de l'favora kondiĉaro por plialtigo de ilia profesia kvalifiko k de l'ĝenerala kulturnivelo—ĉi ĉio donas eblon

al la tuta amaso de laboristaro k oficistaro, senĉese plialtigante la produktivon de l'laboro, pli rapide anteniri laŭ la vojo de plibonigo de ilia materiala bonstato.

Venkfino de l'kolektivigo de la tuta amaso de kamparanaj mastrumoj dum la dua jarkvino, likvido de kulakaro kaj sufokado de ĉiaj provoj de kulaka rezisto, ĉesiĝo de l'kamparanardistavoliĝo je bonstataj k malriĉaj k, ligite kun tio, neniigo de l' mizeriĝo k paŭperismo en la kamparo kun samtempa senĉesa organiza k ekonomia plifortikiĝo de kolĥozoj k rapida kresko de ilia maŝin-teknika bazo — ĉi-ĉio kreas senprecedente-favorajn kondiĉojn por rapida plialtigo de l'materiala nivelo de kolĥoz-kamparana amaso k por finatingo de l'kultura k bonstata vivo de kolĥozanoj k dependigas la tiempon de ĉi plialtigo senpere de l' organiziteco k produktiveco de l' laboro de kolĥozanoj mem.

Konforme al ĉi-tio, la kongreso, aprobante la projekton de l' Ŝtata Plankomisiono en ĉi branĉo, metas jenajn taskojn en la branĉo de l' plialtigo de materiala k kultura vivnivelo de laboristoj k de kamparaj laboruloj:

1. a) kresko de la kvanto de laboristoj k oficistoj al la fino de l' dua jarkvino en ĉiuj branĉoj de l' popola ekonomio je 26%, aparte en la peza industrio — je 29%;

b) kresko de l' reala salajro duoble sur la bazo de l' plena likvido de parazita konsumado, de l' rapida kresko de popola enspezo, da l' pligrandigo de konsumadnormoj por tiaj produktoj kiel viando, graso, fiŝoj, ovoj, sukero k industriaj varoj 2,5-oble, de l' plimalgrandigo de pomalgrandaj prezoj je 35% k de la plua plibonigo de vivkondiĉoj de laboruloj;

c) kresko de l' salajra fonduso de laboristoj kaj oficistoj en la tuta popola ekonomio je 55%, aparte en la granda industrio — je 64%;

ĉ) konsiderinda kresko de ŝtataj elspezoj por kultura k priviva priservo de laboristoj, t. e., elspezoj por la socia asekuro k elspezoj de la ŝtato por la klerigo, sanprotekto k kultura k pri*viva* priservo de laboristoj k oficistoj de 4,3 miliardoj rubloj ĝis 9,3 mlrd. rubloj — kresko pli ol duobla dum la jarkvino;

d) kresko de l' priservo de laboristoj k laboruloj de urboj k vilaĝoj per socia nutrado 2,5-oble;

e) finfaro dum la dua jarkvino ne nur de l' likvido de l' analfabeteco inter la loĝantaro de l' Unio, de l' likvido de la et-alfabeteco de l' laborkapabla maturaĝa loĝantaro k efektivigo de l' ĝenerala devigа elementa instruado, sed anke efektivigo de l' ĝenerala deviga politeknika instruado en la amplekso de l' 7-jarlernejo, unavice — en la kamparo, konsiderante ke en la urbo ĉi-tasko esence jam estis solvita dum la una jarkvino; kresko de l' kvanto da lernantoj (en elementaj k mezaj lernejoj, laboristaj fakultatoj, fabrikuzinaj lernejoj, teknikumoj, superlernejoj k teknikaj superlernejoj) ĝis 36 mln. homoj kontr 24,2 mln. homoj en 1932, t. e. ĝis po 197 pers. je 1000 loĝantoj kontr 147 pers., ne kalkulante la antlernejan edukadon, kiu ĉirkumprenis jam 1932 j. 5,2 mln. homojn;

f) larĝa disvolvo de amasa eksterlerneja laboro, intime ligata kun la organizado de l' kultura ripozo de laborulaj amasoj, pligrandigo de l' kluba reto en urboj k en vilaĝoj ĝis 10.900 kontr 6.800 (kresko en la urboj je 10,5% k en la kamparaj regionoj je 130%) k de l' reto de amasaj bibliotekoj ĝis 25 miloj kontr 15 miloj en 1932j.;

g) plua sufiĉe granda kresko de laboro en branĉo de sanprotekto de laboruloj, ant ĉio — larĝa efektivigo de sanig-profilaktaj rimedoj, pligrandigo de elspezoj por sanprotekto, laborista ripozo kaj fizika kulturo de 5,4 mlrd. rubloj dum la una jarkvino ĝis 19,6 mlrd. rubloj. Kresko de nombro da kuracejaj litoj en urboj je 44% k en vilaĝoj je 98%, kresko de lokoj en infanvartejoj en urboj je 164%, en la vilaĝoj je 129%; kresko dum la jarkvino de la nombro da urboj, kiuj havas akvokondukon, de 366 ĝis 440, de la nombro da urboj kun kanalizo — de 55 ĝis 125, de la nombro da urboj kun tramvojo — de 50 ĝis 70;

ĝ) konforme al tio la kapitalinveston por la komunuma[9]), loĝeja k porkultura konstruado dum la dua jarkvino fiksi en la sumo ĉ. 32 mlrd. rubloj, aŭ ĉ. kvarono el ĉiuj kapitalinvestoj en la popolan ekonomion de Sovet-Unio, el tiu-ĉi sumo por la konstruado de loĝejoj — 13,4 mlrd. rubloj, por urbkomunuma konstruado — 6,2 mlrd., por klerigo — 3,1 mlrd., por sanprotekto — 2,9 mlrd.

2. La tasko levi materialan vivnivelon de laboristoj k kamparanoj postulas ĉiurimede disvolvi varcirkuladon je la bazo de produktado-kresko de industriaj varoj por larĝa konsumado k plibonigi liveradon de agrikulturaj produktoj al urbo.

Konforme al tio la kongreso fiksas:

a) kreskon de varcirkulado 2,5 — 3-oble, de 31,9 mlrd. rubloj en 1932 ĝis 80 mlrd. en 1937 (laŭ la prezoj de 1932), kun samtempa kresko de produktado de objektoj por larĝa konsumado, kiujn fabrikas malpeza kaj nutraĵa industrio, 2,5-oble;

b) plilarĝigon de pomalgranda ŝtata k koopera komerca reto je 37%, kun samtempa ĝia teknika rekonstruo;

c) malaltigon de l'meza nivelo de pomalgrandaj pezoj kompare kun 1932 je 35%.

3. La kongreso fiksas kreskon de l' popola enspezo de 45,5 mlrd. rubloj gis 100 mlrd. aŭ 2,2-oble; kaj kreskon de konsumfonduso en la popola enspezo 2,4-oble kun samtempa grandega kresko de kapitalakumulo en la sociigita ekonomio, k anke kun kresko de ŝtataj rezervoj.

La kongreso akcentas, ke la ekonomia agado devas esti bazita sur la batalado por la efektivigo de propra mastrumbuĝeto en ĉiuj partoj de popola ekonomio, por la plifortigo de plan-financa disciplino, por la plua stabiligo de soveta rublo — de tiu-ĉi plej ĉefa levilo, kiu plifortigas la propran mastrumbuĝeton k ekonomiajn ligilojn inter urbo k kamparo.

---

[9]) t. e., municipala. — la red.

La XVII Kongreso de KP(b)SU konstatas, ke la dua kvinjara plano por la disvolvo de l'popola ekonomio, prezentita de la Ŝtata Plankomisiono de l'Unio k aprobita de l'CK KP(b)SU k de l'Popolkomisararo de l' Unio de S. S. R, asekuras:

a) likvidon de l'kapitalistaj elementoj k de klasoj ĝenerale, finan likvidon de l'privata propraĵo pri la produktadrimedoj sur la bazo de la plena finfaro de l' kolektivigo de kamparaj mastrumoj k kooperigo de ĉiuj hejmmetiistoj; likvidon de l' multsistemeco de l' ekonomio de l' Soveta Unio [10]) k enkondukon de l' socialisma produktadmetodo kiel sola produktadmetodo kun transformado de la tuta laborula loĝantaro en aktivajn konstruantojn de l' socialisma socio;

b) finfaron de l' teknika rekonstruo de la tuta popola ekonomio de l' USSR sur la bazo, kreita dum la periodo de la una jarkvino k iranta la vojon de l' plua rapida plialtigo de l' industrio produktanta la produktadrimedojn (de l' peza industrio);

c) rapidan plialtigon de l' bonstato de laboristaj k kamparanaj amasoj, k krome — decidan pliboniĝon de la tuta loĝeja k komunuma afero de l' USSR;

c) plifortigon de l' ekonomiaj k politikaj pozicioj de la proleta diktaturo sur la bazo de l'unuigo de laborista klaso kun kamparanaro por fina likvido de kapitalistaj elementoj k de klasoj ĝenerale;

d) pluan plifortigon de l'defendkapablo de la lando.

Efektivigo de ĉi taskoj, kondukante al la forpuŝo de lastaj restaĵoj de l' kapitalistaj elementoj el ĉiuj iliaj malnovaj pozicioj k destinante ilin al la finfina pereo, ne povas ne rezultigi la pliakrigon de l'klasbatalo, novajn provojn malutili kolĥozojn flanke de kulakaro, provojn de detrimentista sabotado de niaj industriaj entreprenejoj flanke de kontrsovetaj fortoj. Aliflanke, la efektivigo de l'taskoj de la dua jarkvino, de la jarkvino de radikala plialtigo de l'vivnivelo de laboristaj k kamparanaj amasoj sur la bazo de l'finfaro de l'teknika rekonstruo de l'tuta popola ekonomio, devas rezultigi entuziasmon de laboruloj, alfluon de la produktada aktiveco k kreskantan aspiron al ellerno de l'nova tekniko en la plej larĝaj amasoj de l'laboruloj — konstruantoj de l'socialismo.

Senindulge disbatante kontrrevoluciajn atakojn de la klasa malamiko k amasigante la vicojn de ŝturmuloj de l'socialismo por la venkoplena efektivigo de la dua kvinjarplano, la laborista klaso kune kun kolĥozanaj amasoj, sub la gvidado de l'partio batalanta sendekline kontr ĉia oportunismo, venkos ciujn k ĉiajn malfacilaĵojn sur la vojo al la konstruado de la socialismo.

La XVII Kongreso de KP(b)SU indikas, de la plenumo de l'dua kvinjara plano, de la plano de ĝenerala teknika rekonstruado de

---

[10]) Laŭ Lenin („Pri la provizaĵimposto") en USSR ĉe la jaro 1921 ekzistis kvin „diversaj tipoj de l'soci - ekonomia aranĝo": 1) patriarka, grandaparte natura kamparana ekonomio, 2) eta vara produktado (plejmulto el grenvendantaj kamparanoj), 3) privat - ekonomia kapitalismo, 4) ŝtata kapitalismo, 5) socialismo. En tio konsistis „la multsistemeco", menciata en la rezolucio. — La Red.

popola ekonomio, postulas tian organizon de la afero, kiu asekurus operaciecon[11]) k konkretecon de ĉiutaga mastruma gvidado, kiu ne paciĝas kun burokrataj perversoj en la ŝtata aparato;

due, koncentrigon de plej bonaj inĝenieraj kaj teknikstaj fortoj en decidaj sektoroj de la produktado, sed ne en kancelarioj de institucioj;

trie, ĝustan organizon de perlabora pago de laboristoj, kiu asekurus materialan stimuligon de la kresko de laborproduktiveco;

kvare, plivigliĝon de la socialisma konkurado, pecipe — por pli bone ekmastri novan teknikon k novajn industribranĉojn;

kvine, potencan labordisciplinon en industilaj entreprenejoj, k same en sovĥozoj k kolĥozoj;

sese, revolucian atentemon kontr malamikoj de la diktaturo de proletaro kaj efektivan respondecon ant laborista klaso k ĝia partio por la konfidita afero;

sepe, pluan plifortigon de unuiĝo de laboristoj k laborulaj kamparanoj.

Dum la dua jarkvino USSR faras grandan paŝon anten por la forigo de l'eterna kontreco de la homa socio — de l'kontreco inter la urbo k la kamparo — k kreas ĉiujn necesajn premisojn por forigi ĉi kontrecon. Laŭ sia socia formo la kampara mastrumado fariĝas samtipa kun la industrio, la kampkultura laboro transformiĝas en specon de l'laboro industria, forte kreskas la transportaj ligiloj inter la urbo k la kamparo, konsiderinde interproksimiĝas la kreskotiempoj de l'produktado en la industrio k la kamparekonomio, interproksimiĝas la niveloj de l'materiala bonstato k kulturo de laboruloj en la urbo k la kamparo.

USSR estas transformata dum la dua jarkvino en teknike k ekonomie sendependan landon k en la plej progresivan en teknika rilato regnon en Eŭropo.

La efektivigo de la dua jarkvino ankore pli fortigos la gravecon de l'USSR kiel apogo en la batalo de l'internacia proletaro, ankore pli alten levos ant laborulaj ekspluatataj amasoj de la tuta mondo — la aŭtoritaton de la lando de Sovetoj kiel apoga bazo de l'tutmonda proleta revolucio. La novaj grandaj historiaj venkoj en la konstruado de l'socialismo ankore pli fortikigos la ekonomian fundamenton de batala potenco de l'Soveta Unio. ĝian kapablon forbati k frakasi ĉiajn atencojn de malamikoj de l'prol-ta ŝtato. Potenca ekonomia leviĝo k senĉesa plialtiĝo de l'b nstato d- laborulaj amasoj en USSR, dum la krizo en kanitalistaj landoj, ankore pli brile atestos la avantaĝon de l'socialisma sistemo de l'ekonomio kontr la kapitalisma k la historian kondamnitecon de la sistemo de l'kapitalisma sklaveco, ankore pli plene evidentigos gigantajn kreajn fortojn de l'revolucia proletaro konkerinta la regpotencon k plifortikiganta sian diktatur n en la heroeca batalo por la konstruo de l'senklasa socialisma socio.

---

[11]) Kapablon gvidi ne nur ĝenerale, sed en ĉiu aparta operacio.— La Red.

La XVII Kongreso de KP(b)SU postulas de ĉiuj membroj de l'partio bolŝevike batali por venko de la dua kvinjara plano k alvokas laboristojn k kolĥozanojn grupiĝi sub gvido de l'partio por plenumo de tiu - ĉi historia tasko.

## PRI REAPERIGO DE „LA VOJO DE KLERIGO"

### DE L'REDAKTIO

Per la numero, dediĉata al la epokeca XVII kongreso de KP(b)SU, prezentinta programon de la tuta ekonomia, politika k kultura konstruado de USSR por la 2-a jarkvino,— ni renovigas eldonadon de la bulteno „La Vojo de Klerigo", kiu ne aperis dum 1933 pro teknikaj kaŭzoj.

Enirante en la 9-an jaron de sia ekzisto, „La Vojo de Klerigo" ne ŝanĝas siajn taskojn: 1) Kiel ante ĝi prezentados por eksterlandaj eduklaborantoj informon pri evoluo de l'kulturrevolucio en USSR, precipe en Ukrainia SSR — ĉefe pri socialisma konstruado en la fako de l'edukado. Niajn artikolojn ni prezentos, utiligante materialojn presatajn en organoj de l'Ukrainia popolkleriga Komisario — „Komunisma Klerigo" („Komunistiĉna Osvita") k „Politeknika Lernejo" („Politeĥniĉna Ŝkola").

2) La dua tasko de nia bulteno estas, kiel ante, organizo de l'viva senpera ligo kun progresemaj eduklaborantoj de l'kapitalismaj landoj. Ilia senpera verema informo pri stato de l'lernejo k vivo de l'instruistaro en la burĝaj landoj en formo de artikoloj, informnotoj k leteroj — ĉiam trovos sian lokon sur la paĝoj de niaj gazetoj.

3) La bulteno anke akcelos organizon de l'interligo de lernejoj k apartaj instruistoj de UkrSSR kun progresemaj eduklaborantoj de l'eksterlando, enpresante adresojn de lernejoj, edukistaj kluboj k apartaj instruistoj, dezirantaj korespondadi.

4) Regule informante pri la edukado en UkrSSR, la redaktio de „La Vojo de Klerigo" esperas ricevi interŝanĝe kontr la bulteno eksterlandajn kulturklerigajn k pedagogiajn gazetojn.

La redaktio petas ĉiujn legantojn disvastigi la bultenon, sciigante nin pri adresoj de kulturklerigaj institucioj k eduklaborantoj, dezirantaj ricevadi nian bultenon. Ni sendos ĝin senpage.

Por plue ricevadi „La Vojon de Klerigo" necesas, ke ricevintoj de ĉi-tiu numero speciale informu nin pri sia deziro plue ricevadi la bultenon.

## KULTURKLERIGAJ GAZETOJ EN UKRAINIO

„Komunistiĉna Osvita" („Komunisma Klerigo". estinta „La Vojo de Klerigo") — organo de l'popolkomisario por Klerigo (PKK). Ĉiumonata, 10 pr. f.
La plej malnova pedagogia revuo en UkrSSR. Fondita en 1922. La revuo prilumigas problemojn pri edukkleriga politiko k sistemo, pedagogia k pedologia teorio k praktiko, preparado de fakulkontingentoj. En la revuo estas granda fako pri eksterlanda pedagogia teorio k praktiko.

Ĉe la revuo estas eldonata esperantlingva bulteno por eksterlando „La Vojo de Klerigo", enhavanta koncizan interpreton de plej gravaj artikoloj el „Kom. Klerigo".

2. „Politeĥnična Škola" („Politeknika Lernejo"). Organo de PKK, duonmonata, 5 pr. f.

Amasa pedagogia metodia revuo pri elementa k meza lernejo, dediĉita al problemoj pri organizo de l'pedagogia procedo, al praktiko de l'politeknika instruado. La revuo konkrete helpas al la instruisto, presante primetodajn artikolojn k materialojn, organizante amasan instruistan interŝanĝon pri ped. sperto.

3. „Ratnbildung" („Soveta Klerigo"). Organo de PKK. Dumonata, 5 pr. f.

La jidlingva revuo havas la samajn taskojn, kiel la „Politeĥnična Škola". Krom tio ĝi priservas ĉiujn aliujn fakojn de l'eduk-kleriga laboro inter hebreoj.

4. „Bjuletenj Nar. Kom. Osviti" („Bulteno de PKK"). Ĉiusemajna, 1 pr. f.

La bulteno estas direktiva k instruktiva organo de PKK, publikigas oficialajn materialojn por ĉiuj eduk-klerigaj institutoj k ĉiuj eduklaborantoj.

5. „Za komunistične viĥovannja doškilnika" („Por komunisma edukado de l'antlernejisto"). Organo de PKK. Ĉiumonata.

La revuo enpresas gvidmaterialojn pri organizo k metodiko de l'antlerneja laboro por praktikaj laborantoj, organizas interŝanĝon pri la sperto.

6. „Znannja" („Scio"). Organo de l'sektoro pri l'amasa kom. laboro ĉe PKK. Duonmonata.

Amasa popularscienca gazeto, konatiganta pri atingoj de l'soc. konstruado, pri internacia vivo, kultura konstruado, rekonstruo de l'vivkutimaro, pri novaĵoj en scienco k tekniko. Ilustrita.

7. „Biblioteka u socialističnomu budivnictvi" („La biblioteko en la socialisma konstruado"). Organo de PKK. Ĉumonata.

Teorio k praktiko de l'biblioteka laboro. La gazeto enpresas politikajn, teoriajn, praktikajn k oficialajn materialojn. Inteŝanĝo pri la sperto. Larĝa bibliorgrafio. Ilustrita.

8. „Kultfront" („Kultura Fronto"). Organo de l'Tutukrainia Konsilantaro de l'Sindikatoj. Duonmonata.

Amasa gaseto, dediĉita al kultur-kleriga laboro de l'sindikatoj; kluboj, fabrikaj ruĝanguletoj, laboristaj bibliotekoj, likvido de l'analfabeteco ktp. Riĉe ilustrita.

9. „Bezvirnik" („Kontrreligiulo"). Organo de CK de l'Ukr. militantaj ateistoj. Duonmonata.

Amasa popular-scienca k metodika kontrreligia gazeto, ilustrita.

10. „Neuland" („La Nova Lando"). Organo de CK de l'Ukr. militantaj ateistoj. Duonmonata.

Amasa kontrreligia k kulturkutimara gazeto germanlingva.

(Daŭrigo de la listo sekvos).

## ENHAVO DE „KOM. KLERIGO" (№№ de 1—4 1934).

N-o 1. Lenin pri kulturrevolucio k taskoj de l'edukado. Inter la partikongresoj (4 artikoloj dediĉitaj al resumo de l'eduklaboro dum la periodo inter la 2 kongresoj de KP(b)SU — 1931 k 1934). Metodio k organizo de laboro en la politeknika lernejo (pri politika zorgemo koncernu lernejon, pri instruplanoj, metodio de amasa pristudo de sukceseco de lernantoj, pri german-ukraina lerna movebla vortaro). Eksterlerneja edukado de l'infanaro (infanliteraturo k infana tekniko modelismo). Eksterlande (pri internacia lerneja korespondado en kap. landoj.

N-o 2. Kontr naciismo en eduk-kleriga teorio k praktiko (inter aliuj art-loj de la fako ni nomu ĉi tie tiun de J. Hait kontr la t. n. Ĥarkova ped. skolo). Politeknika lernejo (pri metodia preparado de l'instruisto, lerneja konstruado en 1934, porvidaj instruiloj). Ped. kontingentoj (pri plialtigo de kvalifiko ĉe pedagogoj per korespondkursoj, ped. kontingentoj por naciminoritoj). El la sperto. Eksterlande (pri socia klasdisigo ĉe la angla instruistaro).

N-o 3. V. Zatonskij. Pri T. Sevĉenko fama ukraina revolucia poeto. Por definitiva malkovro de naciismaj pedagogiaj teorioj (en la

fako de l' teatra laboro, en instruado de geografio k ukr. lingvo). Politeknika lernejo (pri pedologiaj postuloj por kunmeto de leciona hortabelo). Ekzamenoj (metodio de l'ekzamenoj, la pasintjara sperto). Pedagogia klerigo (pri metodia studĉambro, pri instruo de higieno en ped. superlernejoj). Eksterlande (eduko k klerigo en Hindio sub la brita imperiismo).

N-o 4. Internacia edukado (Lenin pri internacia edukado, pri internacieduka laboro de IRH). Somera saniga laboro inter infanoj (kelkaj artikoloj preparaj por la somero). Politeknika lernejo (pri la stabila lerno-libro, suplementa instruado de postrestintaj infanoj). Apudlerneja terpeco (2 artikoloj pri modela apudlerneja agromastrumado). Eksterlerneja edukado (pri natursciencaj infanlibroj). Ekzamenaj sesioj en la superlernejo (pri taskoj de l'ekzamenoj). Kontr naciismo en la eduka fronto (kontr naciismaj elaperoj en la biblioteka laboro). Eksterlande.

UUUXV̄ - 944

Видає — „Радшкола“ Відп. редактор Г. М. Баданський
Техредактор Кругляков

Здано матеріал до складання 26/V 1934 р. Підписано до друку 29/VII 1934 р.
1 друк. аркуш; в 1 друк. арк. 55.000 знаків.

Уп. Головліта № 2704. Зам. 3326. Тираж 2.500 Кн. ф-ка ім. Г. І. Петровського.